



Norvega Esperantisto

ESP ERANTOBLADET

N-ro 8
1970

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
36-a (41-a) jaro
Monata

La laborplano de N.E.L.

Konforme al la Dua Baza Laborplano de U.E.A. la landa kunveno de N.E.L. en 1963 aprobis landan laborplanon por Norvegujo. Ĝi estas publikigita en Norvega Esperantisto n.ro 7/1963, kaj ni sugestis ke ĝi daŭre kuŝu sur la labor-tablo de ĉiu esperantisto, por ke oni ĉiutage atentu pri ĝi. Timante ke ĝi eble jam malaperis de la labortabloj de kelkaj el niaj membroj, ja eĉ ke vi preskaŭ ĉiuj tute forgesis pri ĝi, la Liga Estraro decidis detale okupiĝi pri nia konstanta laborplano en serio de artikoloj en Norvega Esperantisto. Ni petas vin atente legi la artikolojn kaj *agi* konforme al la punktoj, pri kiuj *vi* povas kontribui. Jen la unua artikolo:

La enkonduko de la laborplano diras: «Daŭrigante la ĝisnunan agadon por Esperanto sen malatento pri iu el la taskoj ĝis nun prizorgitaj, ĉiu elektita oficulo kaj

ĉiu unuopa membro en sia por-Esperanta agado precipe atentos pri jenaj taskoj:» El tiu enkonduko vi vidas ke la plano koncernas ne nur la estraranojn, sed ĉiun membron. Tial: studu la sekvantajn ĉapitrojn, diskutu ilin en klubkunvenoj, kaj antaŭ ĉio: *agu!*

Ĉapitro I temas pri Organiza plifortigo, kaj ĝi havas 7 punktojn:

1. «Plialtigo de membronombro per remembrigo de esperantistoj, kiuj ĝis nun ne aliĝis al N.E.L., — se necese per novaj membrokategorioj». Kelkaj kluboj provis tion, kun pli-malpli bona sukceso. Sed multaj kluboj nenion faris tiurilate. Ni scias ke multe pli ol 10 000 norvegoj iam lernis Esperanton. N.E.L. estas preta sendi kopion de sia ĉefkartoteko pri la koncerna loko al kluboj, kiuj volas provi revenigi la iamajn kursanojn de la loko. Ĉi tie ni havas grandan rezervon de eblaj membroj.

2. «Respondeo de ĉiu membro pri la agado de la Ligo per individua voĉdonrajto en ĉiuj ĝeneralaj kunsidoj.» Tiu punkto estas realigita per la lasta statutŝanĝo de N.E.L.

3. «Dislokigo de oficoj kaj labortaskoj tutlandaj al membroj ekster la ĉefurbo, — kun ofta raportado al Liga estraro kaj al Norvega Esperantisto.» La korespondaj kursoj estas estrataj en Trondhejmo, kaj la Gazetaran Servon ĵus transprenis s.ino Elna Matland en Sauda. La redaktoro de nia gazeto sidas en Sarpsborg. Cetere estis tre malfacile trovi homojn en aliaj lokoj, kiuj estas pretaj transpreni tutlandajn taskojn. Ĉu iu anoncos sin por difinita tasko?

4. «Plifortigo de kluba aktiveco apogata de pli vigla kontakto inter kluboj kaj Liga estraro per klubaktiveca estrarano.» Tiun ideon oni bedaŭrinde pretervidis. La Liga Estraro nun klopodos realigi ĝin.

5. «Plifortigo de kontakto inter Liga estraro kaj unuopaj membroj ekster klubaj lokoj.» Tiurilate la Liga Estraro senĉese klopodas. Ni sendis cirkulerojn kaj leterojn al rektaj membroj por aktivigi ilin, sed la rezultato estas tre malgranda. Ni daŭrigos la klopodojn, sed ĉi tie petas ĉiujn rektajn membrojn, kiuj serioze interesiĝas pri la diskonigo de Esperanto en siaj lokoj, turni sin al N.E.L. Ni ĉiam estas pretaj helpi ilin per kon-

siloj kaj materialo. Ĉiu rekta membro devus esti la bazo por nova klubo en la koncerna loko!

6. «Sistema registrado de membroj kiuj estas pretaj kaj kapablaj prizorgi specialajn taskojn en la laboro de N.E.L., ekzemple rilate al informado, organizado de kursoj, instruado, fondado de lokaj societoj, preparado kaj prezentado de programeroj por kunvenoj.» Bonvolu relegi tiun punkton kaj tuj skribi al N.E.L. informante por kia tasko oni vin registru! Havante reton da registritaj kunlaborantoj por la unuopaj laborkampoj ni povus fari multe pli da efika laboro por Esperanto.

7. «Plialtigo de Norvega membronombro en U.E.A. kaj en aliaj internaciaj Esperanto-organizoj per ĉiama instigado al membriĝo.» Estas malfacile kompreni kiel oni povas esti esperantisto kaj ne esti Individua Membro de U.E.A. kaj de la faka Esperanto-asocio, kiu laboras por la internacia lingvo en la fako, en kiu oni mem laboras. Ĉu ni diru ke unuavice ĉiu aktiva esperantisto norvega en 1971 fariĝos almenaŭ Individua Membro de U.E.A.? (Vidu sub Sciigoj de N.E.L. en ĉi tiu n.ro). Nur se oni abonas la Jarlibron de U.E.A., oni povas plene profiti la utilojn de Esperanto, kaj nur abonante la oficialan organon de U.E.A. oni estas sufiĉe informita pri la movado por povi efike informadi al neesperantistoj.

(daŭrigota)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Fortikigi kaj fortigi

Ĉi tiu «kolono» de la redaktoro plej ofte okupiĝas de admonoj. Tiel devas esti. Sed ne devus esti.

Ni ĉiuj laboras aŭ agas libervole. La tempo estas nia, la fortoj estas niaj, la mono estas nia. Ni libervole oferas.

Sed ankaŭ la intereso estas nia.

La ideo estas nia, la lingvo estas nia.

Same la paca batalado.

Tial temas pri fortikigado, fortigado.

Ni fortikigu nian kastelon! La kastelo estas la Ligo kaj la kluboj. Ni bezonas homojn en la kasteloj. Tiuj homoj bezonataj ne venas sen informo pri la ideo. Tiun informon devas doni ni.

Ni tial devas fortigi nin mem. Tion ni faras per studlaboro, perfektigo de niaj lingvoj scioj. Tial: aĉetu literaturon!

Bedaŭrinde estas bezonata ankaŭ mono. Kaj mono ne nur por aĉeti Esperantan literaturon (La aŭtoroj ne riĉiĝas pro tiu mono! Sed eble vi mem riĉiĝos!)

La mona afero estas nia malforta punkto.

Ĉu vi aŭdis pri la poŝtmarka vendado de Norvega Esperantisto? Ĉiuj kluboj ricevis cirkuleron, la gazeto vaste informis.

Pli ol 70 % de la reagoj venis el eksterlando!

*

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1971. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas sian kotizon frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. Kvankam ni ĉi-jare plialtigis la kotizojn, ni tamen ankoraŭ ne povas aperigi dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto, kiel ni deziras. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur la 3a paĝo de ĉiu numero.

U.E.A.-kotizoj 1971. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1971. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118a, Oslo 6, poŝtgirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1971 estas neŝanĝitaj: Membro-Jarlibro kr. 30,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 60,00, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 90,00.

56a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Londono, Anglujo, somere 1971. Aliĝiloj estas riceveblaj de Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Nova filmo. La Norvegaj Stataj Fervojoj eldonis turistfilmon pri suda Norvegujo kun Esperanta parolo. La filmo nomiĝas «Mi estis tie», larĝeco 16 mm., daŭro de prezento 20 minutoj. Norvegaj kluboj povos pruntepreni ĝin de N.E.L.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ksigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkevarono. Okazis unu estrarkunveno kaj oni elsendis unu cirkuleron al la kluboj. Thure Resberg reprezentis N.E.L.n ĉe la U.K. en Vieno, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. N.E.L. estis reprezentata en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto per 253 voĉoj. N.E.L. heredis 10 akciojn en la Eldonejo post s.ino Aagot Sletterød. Oni serĉadas novan oficejon (ĉar la nuna domo estas malkonstruota) kaj vane serĉis malpli multekostan presejon nor nia gazeto. Kunlabore kun la ceteraj nordaj landaj asocioj oni planas diversajn iniciatojn al la aŭtoritatoj.

La Liga Estraro.

FORPASOJ

Dum la somero forpasis du fide-
laj membroj de Klubo Esperantista

en Oslo: fervoja konduktoro Rolf
Uhlen, kaj s.ino Olga Wilke.

*

KASTELO GRESILLON:

10-a PASKA KULTURA SEMAJNO

De la dimanĉo, 4-an de aprilo 1971, ĝis la vendredo, 9-an de aprilo 1971 (inkluzive), okazos en la kastelo «Grésillon» — 49 — Baugé (Francujo) la 10-a Paska Kultura Semajno.

La organizanto de la venonta Paska Kultura Semajno estas S-ro René *Llecb-Walter*, Honora Prezidanto de U.F.E., 5, quai Vauban-66 — *Perpignan*, kiu respondos al ĉiuj informaj petoj.

Malfruiginta danko al gratulintoj

Kvankam malfrue mi en nia organo volas esprimi mian koran dankon al ĉiuj norvegaj samideanoj kiuj flore, telee aŭ skribe gratulis min okaze de mia 75-jara jubileo lastjare. La pli multajn mi tuj rekte dankis, sed kelkaj restis.

Precipe min ĝojigis la libra donaco kun dediĉo de Norvega Esperantista Ligo, la bukedoj de Klubo Esperantista en Oslo kaj de Gaja Rondo, samloke, la «fanfaron» versaĵo de la Esperantoklubo de Bergen — la urbo de miaj infanaj jaroj —, la salutoj de la kunlaborantoj de la unuaj jaroj de «Esperantobladet» (inter ili s-o Oluf Olsen, la fidela tipografo), kaj tiu de la redaktoro de «Norvega Esperantisto», kiu ankaŭ presigis la nemerititan ĉefartikolon de nia LKH. — Sed gratulo estas stimulo.

RoBoPo

Aldonoj al la jarraporto de N.E.L. pri 1969

Ĉar finfine alvenis la raporto de la kvar gravaj sekcioj, pri kiuj mankis informoj en la Jarraporto publikigita en n.ro 4, ni jen donas eltiraĵon el tiuj raporto.

Informa Fako (Komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito instigis lokajn gvidantojn de informado kaj klubojn al varba aktiveco, i.a. per speciala bulteno pritraktanta aktualajn temojn kaj taskojn. Dum la 54a U.K. en Helsinko li partoprenis kunsidon de informaj Fakoj kaj kunvenon pri la Semajno de Internacia Amikeco.

Gazetara Servo, gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 7 bultenojn kun sume 13 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; 3 el la bultenoj aperis en ambaŭ oficialaj lingvoformoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 93 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 219 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 312 aperigojn (311 en 1967) en 81 gazetoj kaj revuoj (84 en 1968). Ensenditaj artikoloj, artikoletoj, raporto kaj aranĝitaj redakcio-vizitoj kaj intervjuoj pravas kreskantan aktivecon de kelkaj unuopaj rektaj kunlaborantoj kaj de unuopaj klubanoj kaj rektaj membroj de N.E.L.

Radio (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). Raportiĝis 4 intervjuoj po 5—6 min. pri Esperanto, krome Otto Prytz enŝovis mension pri

Esperanto en intervjuon pri alia temo; krome estis 2 mallongaj anoncoj pri kunveno de la Laborista Esperanto-Klubo en Oslo. 2 el la intervjuoj estis regnaj, la ceteraj programeroj lokaj (Hamar kaj Oslo). En la Televido aperis nenio. Oni rifuzis kovri la inaŭguron de la Esperanto-strato en Løten. La Esperantaj radioprogramoj aperis dufoje en «Programbladet». Pola Radio elsendis intervjuon kun Annalise Torgnes kaj kun C. Støp-Bowitz (la lasta ripetiĝis plurfoje).

Interŝtataj organizaĵoj (Komisito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO daŭre laboras la svedaj UNESKO-Komisiono kaj registaro. La Eŭropa lingvo-kampanjo daŭre stagnis post la morto de d-ro Herrmann. La komisiito denove kolektis proponantojn pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio 1970.

Salutparolado al la 55-a U.K. de Esperanto en Vieno

S-o Prezidanto, kongresanoj!

Denove mi havas la honoron saluti la Universalan Kongreson de Esperanto en la nomo de la Norvega Registaro, kiu komisiis al mi tion fari — ĉi foje la 55-an, kiu okazas en la fama metropolo Vieno, urbo en kiu troviĝas ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo, tiu unika monumento super sindona pieco flanke de la aŭstra popolo al unu el la plej grandaj ideoj de nia epoko.

Unu el la geniaj flankoj de la

ideo Esperanta estas ke ĝi kombinas kapablon krei preskaŭ tujan internacian komprenon kun kapablo konservi la naciajn lingvojn en ilia tradicia formo. Esperanto kapablas *protekti* la naciajn lingvojn, ĉar, donante al la homaro *plentaŭgajn internaciajn vortojn*, ĝi samtempe kapablas redukti la bezonon serĉi tiajn el najbaraj lingvoj — kaj *precipe* ĝi kapablas — teorie kaj praktike — kontraŭi la kreskantan premon de la *grandaj* lingvoj al la *malgrandaj*. Jen nova grava misio por la lingvo de Zamenhof!

Estas la morala devo de ĉiu nacio, ĉiu gento, respekti kaj amiasian gepatran lingvon. La norvega parlamento, konsciante pri la nuna situacio, lastan printempon instalas novajn lingvajn instituciojn sub la rubriko «*Lingvo-protektio*» — protekto de la norvega lingvo, ĉar ĉi tiu havas malamikojn — eksterajn, kaj bedaŭrinde ankaŭ internajn. La norvega popolo devas trovi novajn rimedojn kontraŭ la trudo flanke de la grandaj lingvoj, *precipe de la angla*, se ĝi ne volas sperti la detruon de sia lingvo, kaj la nelegeblon de la literaturo de sia tiel nomata «ora epoko» en la lasta duono de la pasinta jarcento kaj en la komenco de la nuna — flanke de la nuna junularo. Ĉe ni en Norvegujo ni nun devas konscie kontraŭbatali la plej ofte *tute* superflujajn novajn vortojn. En tiu laboro Esperanto povas helpi nin — kondiĉe ke la aŭtoritatoj tion komprenos.

R. Bugge-Paŭlsen

UNU EL LA PLEJ FRUAJ

S-ino Gitta Jønsson, Tromsø, lernis Esperanton de s-ro H. T. Thomsen dum la vintro 1904—1905, kiam li restis tie, li faris kurson en la hejmo de S-ino G. Jønsson.

Ŝi multe sin interesis pri esperanto, dum sia vivado, sed tro okupita je politikaj — kaj sociaj demandoj kaj agoj, ŝi ne trovis tempon por la Esperanta laboro.

Saxer J. Ebeltoft

La Internaciaj Kursoj en Helsingør

Bona varma vetero bonvensalutis la partoprenantojn en la Internaciaj Feriaj Kursoj de Elsinoro, Danlando. S-ro L. Friis, la ĉefo de la kursoj, persone bonvensalutis ĉiujn, kaj informis ĉiujn pri la ĉambroj, slosiloj, necesejoj ktp. Je la 20-a horo okazis la mallfermo de la kursaranĝo en la granda prelegejo.

La Internacian Altlernejon ĉirkaŭas granda parko. Ĉiuj partoprenantoj loĝis kaj manĝis en la lernejo. Estis anoj de multaj nacioj kiel granda familia grupo, kie oni parolas nur Esperante.

Granda parto de la Internacia Altlernejo estas rekonstruita. Ĝi estas nova kaj moderna, preskaŭ luksa. La ĉirkaŭa parko estas belega kaj granda kaj donas lokon por kampado por partoprenantoj.

Nur antaŭtagmeze okazis la instruado en 4 diversaj grupoj. 1-a grupo: Elementa kurso laŭ Metodo Friis. Ĝin povas partopreni anoj de diversaj nacioj, ĉar la metodo estas internacia kaj aplikas nur Esperanton. Per tiu metodo oni lernas pli multe ol per alia metodo dum unu semajno.

2-a grupo: Konversacia kurso, kiun gvidis s-ino Tove Bak, tre lerta en sia fako. Multaj samideanoj bezonas parol-ekzercon, kaj tial tiu kurso estis tre grava ankaŭ por mi.

3-a grupo: Perfektiga studrondo, sub gvido de s-ro Moravec, sperta kaj ŝatata gvidanto de studrondoj. La ĉefaj temoj estis diskutado kaj studado de la stilo kaj formo de nia lingvo.

4-a grupo: Eminent pedagogo kaj sperta lingvo-instruistino s-ino E. Andersen faris kaj la elementan kurson kaj la preparan kurson por Friis-metodaj instruistoj. Ĉi tiu metodo — simila al naturmetodo — estas la metodo de la moderna homo kaj de la moderna tempo.

Posttagmeze ni aranĝis komunajn ekskursojn al diversaj vidindaĵoj, ekz. al Kronborg kaj Hillerød kasteloj, al Fredensborg kaj al la sveda urbo Hälsingborg. Vespere oni aranĝis gajan programon, prezentadojn de filmoj kaj lumbildoj.

Ĉi-jare la unuan fojon pagis la instruistojn la dana liberinstruado.

Th. Resberg

MORTOJ

Montagu C. Butler, unu el la plej konataj britaj esperantistoj, mortis la 5-an de majo, en la aĝo de 86 jaroj. Li estis multjara redaktoro de «The British Esperantist». Li ankaŭ estis membro de Akademio de Esperanto.

Maurice Jaumotte mortis la 30-an de juli en la aĝo de 71 jaroj. Li estis gvida belga esperantisto kaj prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, Kunlaborinto de Plena Ilustrita Vortaro, estrarano de UEA.

*Kial kongresi en la brita ĉefurbo? Ĉu Londono estas vizitinda?
Pri ĝiaj elstaraj trajtoj rakontas J. Gifford Fowler . . .*

LONDONO ALVOKAS

At length they all to merry London came (Al gaja Londono fine ĉiuj venis)
— el *Prothalamion*, de Edmund Spenser, 1552—1599

La statuo de Amoro, kiun oni elektis kiel simbolon de la 56-a Universala Kongreso, staras en la mezo de Piccadilly Circus, en la nabo de Londono. Sed kio estas tiu Londono? Kion ĝi prezentas por la vizitanto?

Unu vizitanto, kiu ne estis anglo, diris antaŭ kvincent jaroj: «Londono, vi estas inter ĉiuj urbegoj floro!» Antaŭ ducent jaroj D-ro Johnson, la leksikografo, kiu naskiĝis ne en Londono, rimarkigis: «Vidinte Londonon, mi vidis tiom de la vivo, kiom povas montri la mondo», kaj plue: «Kiam iu homo enuas pri Londono, li enuas jam pri la vivo.»

Londono certe posedas ian kaŝitan kvaliton, per kiu ĝi enamigas al si eĉ tiujn, kiuj ne estas ĝiaj propraj infanoj, kaj vekas en ili specon de patriotisma sento por ĝia honoro. Ĉu ne la roma imperiestro Augustus volis doni al ĝi sian propran nomon? Eĉ kimra historiisto de la mezepoko, por ke oni ne estimu antaŭ ĝi alian urbon, rakontis en sia grava verko legendon tute ne kredindan, ke ĝi estis fondita ok jarojn antaŭ ol Romo.

Oni efektive ne scias, en kiu jaro fondiĝis Londono. Preskaŭ certe antaŭ ol, meze de la unua jarcento antaŭ Kristo, venis la Romianoj, kiuj latingis kiel *Londinium* ĝian antaŭan keltan nomon. Tiuj romianoj tie konstruis ponton el ligno eĉ la loko plej proksima al la maro, kie por ili Tamizo estis pontebla. De tiam la

Londona Ponto restas fama, kaj de tiam jarcenton post jarcento la urbo kreskis.

Ne supozu, tamen, ke en Londono vi trovos imponajn romiajn restaĵojn. Restas nur kelkaj baskoj de la urba muro, kelkaj ŝtonoj de templo de Mitrao k.t.p.

Oni ne forgesu, ke Londono estis diversfoje detruita. La monaĥo Fitzstephen, kiu en la 12-a jarcento verkis priskribon pri Londono, klarigis, ke «la solaj malkonvenaĵoj de Londono estas la malmodera drinkado de stultuloj kaj la oftaj incendioj». (Eble ekzistis rilato inter la du fenomenoj, kiuj tamen nun ne plu estas timindaj.) El tiuj incendioj la plej fama okazis en 1666, kiam pereis kvin sesonoj de la urbo.

Malgraŭ tio restas al ni kelkaj preĝejoj el la mezepoko kaj kelkaj aliaj konstruaĵoj. Inter ili vi certe volos viziti *Guildhall* (Urbodomon), kie en 1907 D-ro Zamenhof paroladis pri patriotismo; ankaŭ *Westminster Abbey*, (Abatejon de Westminster) kaj la «*Turon de Londono*», grandan antikvan fortikaĵon, kie oni povas vidi, inter aliaj interesaĵoj, la reĝajn juvelojn.

Ni fieras ankaŭ pri la belaj konstruaĵoj kreitaj post tiu Granda Incendio de 1666. Menciindaj estas tuta serio da preĝejoj, konstruitaj tuj post la Incendio ĉiuj de unu sola arkitekto, Sir Christopher Wren, al kiu ni ŝuldas ankaŭ la bazilikforman *Katedralon de Sankta Paŭlo*. La amanto de arkitekturo trovas aparte fra-

pa la viglan elpensemon, kiun atestas iliaj turoj.

Inter tute modernaj konstruaĵoj, interesaj estas *Royal Festival Hall* (koncert-halo, kie okazos nia inaŭgura kunsido), la mirinde bela *ponto de Waterloo*, kaj la *Radiotelefonio Turo*, de kies supro oni vidas panoramon de la urbejo.

Londono tamen ne konsistas nur el brikoj kaj ŝtonoj. Ni sentas fieron ankaŭ pri niaj verdejoj. La parkoj estas multaj, grandaj kaj malgrandaj. *Hyde Park*, ekzemple, kovras proksimume 350 hektarojn, kaj flanke de ĝi kuŝas *Kensington Gardens* (275 ha.). Eĉ pli vasta estas *Regents Park* (400 ha. kun zoologia ĝardeno). La parkoj havas belajn florbedojn, sed plejparte estas neformalaj; kaj sur la herbejoj oni rajtas . . . marŝi, ludi, sidi, kuŝi, kaj pikniki. En Hyde Park oni povas ankaŭ naĝi en la lago.

Apartaĵo de Londono estas malgrandaj parkoj aŭ ĝardenoj sur multaj el la placoj. Kelkaj el tiuj parketoj estas nun publikaj, sed aliaj estas kvazaŭ privataj komunaj ĝardenoj de la loĝantoj de la domoj ĉirkaŭ la placo.

Multaj kongresanoj volos viziti la muzeojn kaj artgaleriojn, pri kiuj Londono prave fieras. Endaj estas *Brita Muzeo*, *Nacia Artgalerio* (ĉe la fontanoj kaj kolomboj de Trafalgar Square), kaj *Galerio Tate* (moderna arto).

Aliaj volos butikumi en la grandaj magazenoj, kie pro valutaj kaj aliaj kaŭzoj la prezoj estas por multaj eksterlandaj vizitantoj nun tre maltaj. Aŭ eble oni preferos simple pasumi laŭ Regent Street, Bond Street kaj Oxford Street por rigardi la montrofenestrojn . . . kaj ni ne forgesu pri *Carnaby Street* por lastmodaj jununlaj vestaĵoj.

Laŭ unu fama politikisto la rivero,

Tamizo, estas «likva historio». Per plezurŝipetoj oni povas facile kaj komforte veturi sur ĝi, vidante samtempe la urbon.

Alia bona posteno por gapi estas seĝo sur la imperialo de ruĝa Londona aŭtobuso.

Sed — se oni havas liberan horon — oni plej bone esploru Londonon surpiede. Kvankam ĉe la grandaj stratoj oni trovas la plej imponajn monumentojn, tamen nur laŭirante la kaŝitajn stratetojn oni vere ekkonas la spiriton de Londono kaj ekamas nian vastan, grizan, amikecan urbon. Tiuj malgrandaj vojoj ofte havas strangajn, interesajn nomojn, ekzemple: *Hanging Sword Alley* (voĵeto de la pendanta glavo), *Jacob's Wells Mews* (stallaleo de la puto de Jakobo), kaj *Bleeding Heart Yard* (korto de la sanganta koro). Kelkaj stratetoj portas la nomon de la varoj, kiujn oni antikve vendis tie, ekzemple: *Wood Street* (lignostrato), *Bread Street* (panstrato), *Beer Lane* (bierstrato), eĉ *Love Lane* (amstrato)!

Kompreneble, ke por ĉion vidi ne sufiĉas unu semajno (nek unu jaro). Per niaj aranĝoj ni faras nian eblon, se ne por satigi ĉiun guston, almenaŭ por veki ĉies apetiton.

Multon oni skribis malŝate pri la Londona vetero. Aŭtoroj de la pasinta jarcento ofte priskribis ties flavajn nebulegojn. Hispana romanisto nomis Londonon «la civito de la nebuloj». Tiajn dirojn oni ne atentu. Hodiaŭaj saĝaj leĝoj tiel malpliigis la produktadon de fumo, ke eĉ en Novembro oni malofte spertas gravan nebulon, kaj certe ne plu flavan.

Ni aldonu, por kuraĝigi niajn eventualajn gastojn, ke, kiam lastfoje la Universala Kongreso okazis en Londono, oni spertis semajnon de perfekta vetero.

La historio ripetigu!

JULIN 90-JARA

Multaj norvegaj esperantistoj konas lin — Teodor Julin, iaman ĉefpoŝtestron de Stokholmo. La 31-an de oktobro li estos 90-jara, sed li ankoraŭ estas aktiva esperantisto.

Ni konas lin kiel tre afablan kaj tre sciorigan homon. Li iam estis mia gvidanto tra la malnovaj urbopartoj de Stokholmo — kaj tiu horo estis unu el la plej interesoj en mia vivo.

Jam tuj post la milito mi konatiĝis kun li kaj lia ĉarma edzino, kiu estis tiam redaktoro de La Espero, kaj mi sentas min feliĉa kaj fiera estante ilia amiko.

Teodor Julin estas unu sola. Ni deziras al li ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn kaj kore gratulas pro la jubileo!

JHR

NEL en la UK

En al Universala Kongreso de Esperanto en Wien Norvegan Esperantistan Ligon reprezentis

Thure Resberg, Sarpsborg.



å få

Vi har svært ofte bruk for uttrykk der verbet «å få» forekommer på norsk. Det er klart at man ikke uten videre kan slå opp i en ordbok og bruke *ekhavi* eller *ricevi* som man der finner. *Ricevi* betyr «få» i betydningen «motta», og prefikset *ek-* gjør det tydelig at *ekhavi* må bety «begynne å ha».

En klubb ville gjerne få en uten-

Tridex unu Landaj Asocioj

Sudafrika Esperanto-Asocio, fondita en 1962, aliĝis al UEA. Ĝi estas la 31a Landa Asocio, kiu ĝis nun aliĝis. (Krome aliĝis tri Fakaj Asocioj.) Samtempe, SEA estas la tria Landa Asocio de UEA en Afriko. La aliaj estas en Kongo (Kins-hasa) kaj Madagaskaro. La aliĝo-peton de SEA la Komitato de UEA aprobis per skriba voĉdono.

Kvankam la sola oficiala lingvo de Sudafrika Esperanto-Asocio estas Esperanto, la Asocio uzas ankaŭ la anglan kaj la afrikansan por siaj eksteraj rilatoj. La bulteno de SEA, «Bona Espero», enhavas tekstojn en ĉiuj tri lingvoj. Laŭ la Statuto de SEA, povas aliĝi al ĝi ĉiu persono, kiu simpatias al ĝiaj celoj kaj pagas la kotizon.

landsk lærer til byen. *Ekhavi* er ikke noen god oversettelse, men til nød forståelig; *ricevi* er ubrukelig. Det er da man skal *tenke på esperanto*. Det man ønsker er å få mannen til å komme: la klubbo deziras *venigi* eksterlandan instruiston. Dermed har man også løsningen på problemet «få bort en flekk»: *forigi* makulon. «Få i stand» kan ofte gjengis med *aranĝi*, f. eks. en fest, eller *kaŭzi*, f. eks. en krangel.

*

standardo og standard

Esperanto-ordet *standardo* betyr et flagg, f. eks. la verda standardo, og kan følgelig ikke brukes om «standard».

«Leve-standard» gjengis brukbart med *viv-nivelo*. I et reisebrev leser vi at boligstandarden ikke er så høy som i Norge. *Nivelo* anbefales her, av lett forståelig grunn. Hvorfor ikke si *la kvalitate de la loĝejoj?*

Ak III

56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

LONDONO, 31.7.—7.8.1971

Alta Protektanto: Ĉefurbestro de Londono

Konstanta Adreso: Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Aliĝkotoj ĝis la 31.12.1970

	gld.	£ s
1. Kongresano ne membro individua de UEA	85,—	9.15
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ)	70,—	8. 3
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo «Esperanto» (MA)	55,—	6. 6
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (1)	59,50	6.17
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3)	49,—	5.13
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	25,50	2.19
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara	42,50	4.18
8. Blindulo	34,—	3.18

Senpage «Esperanto»

Ĉiu kongresano en kategorio 1 (t. e., kiu ne estas membro individua de UEA), ricevas senpage la revuon «Esperanto» dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.

Unua Bulteno kaj Aliĝilo

Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Unua Bulteno kaj samtempe la aliĝilo por Londono estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe la kongresaj perantoj, ĉe la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj de UEA.

Propaganda glumarko

Ankaŭ ĉi-jare aperis bela glumarko pri la Kongreso. Mendojn ak-

ceptas la Libroservo de UEA. La prezo de dekmarka folio estas 0,50 gld. (Por Nederlando 0,56 gld.)

«La londona buso»

Ruĝkolora londona aŭtobuso veturiganta pasaĝerojn al la «56-a Universala Kongreso de Esperanto» estiĝis temo de la oficiala kongresa afiŝo. Laŭ originala desegnaĵo de s-ro K. T. Bartoŝik la preseldonon iniciatis s-ro P. Schilperoord (ambaŭ el Londono). La afiŝo estas mendebla ĉe Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London W 11, Britujo. Por Landaj Asocioj senpage, por individuaj petantoj kontraŭ produkto- kaj sendokostoj.

*

En la mezo de nenie (Prince George, Kanado)

de Dag Stacey Westgaard

«Kiu dezirus estiĝi seksuĉata par moskitoj dum la somero aŭ sidi ĉirkaŭ la forno dum la vintro klakigante la fingrojn?»

La pensoj de suduloj pri la norda vivo senĉese surprizas min. Ĉi tie ni estas en Prince George, supezeble en la mezo de nenie, sed tamen, kion ni vidas ĉirkaŭe?

Ĉu ni vidas veter-harditajn ŝtipkabanajn, hund-jungitarajn sur la vojetoj kaj milit-koloritajn indianojn? Ne!! Tute ne! Anstataŭe ni trovas ĉi tie, same kiel en multaj sudaj urboj, la samaĵojn: modernaj, nudaj kaj seninteresindaj loĝejoj, aranĝoj, motorizitaj veturiloj ĉiuj-specaj malordigante la serpentajn vojetojn kaj ŝoseojn, kaj pacemaj indianoj kiuj antaŭ longa tempo estis subigantaj par la «pravaj» metodoj de la blanhautuloj.

Jes, ĉi tiu lando estas tia speco, kiu ne apatiĝas iun ajn . . . eĉ minimume. Ĉiuj el la modernaj helpiloj kaj elpenaĵoj estas ĉi tie kun sia neevitebla dualeco: ili estas kaj bonaĵoj kaj malbonaĵoj. Niaj urbocentroj kaj butikaroj ofertas la lastajn komercaĵojn kaj servojn. Multajn fojojn tage, aviadiloj, aŭtobusoj kaj vagonaroj kunigas nin kun la ekstera mondo. Elektronaj komunikiloj estas preskaŭ tiel progresintaj ĉi tie kiel pli sude. Iu kiu dezirus veni al Prince George por izoli sin fra la tagaj

aferoj kaj respondecoj de civiliza socio, povus ja bone ĉesi paki siajn valizojn. Norda vivo postulas partoprenadon, ĉu tio estas la helpado al la najbaro por ekfunkciigi lian aŭton, aŭ ĉu la pentrado de la dekoracioj ĉe la amatora teatra produktado. Klubo kaj societoj dediĉas sian tempon al kio ajn, al kio kluboj kaj societoj dediĉas sian tempon. (Fakte, apenaŭ tago forpasas sen petego por io par iu.)

La nordulo, kiel la sudulo, povas priskribi sian vivmanieron esti civiliza . . . se li ne estas ermito. Multaj el ni estas iom el ambaŭ specoj, kaj civilizulo kaj ermito; estas situacio ke la nordo permesas unike. Kiel povas la vastega malpleneco de arbaro kaj montaro, atendante je centoj da mejloj ĉien, lasi iun sen iom da senta timeto? Ĉi tie viro povas perdiĝi, sed samtempe, en vera senco, trovi sian veran memon. Tie ekstere inter la tremantaj tremoloj kaj glaŭkaj piceoj li povas ankoraŭ trovi netuŝitan fluon kaj entrinki ĝian puran mesaĝon de anima konsolo.


«La korpo sentas sin hejme en la urbo, sed la animo sopiras al la kamparo.» Saĝulo iam diris tion. Ĉi tie en la mezo de Brita Kolumbio, Kanado, ni povas havigi al ni ambaŭ facetojn. Ho jes, mi preskaŭ forgesas: la moskitoj estas

(Daŭrigota p. 110)

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



(Daŭrigo)

Travivaĵoj dum vojaĝo al Rimini

Fred. diris ke ĉi tie oni devas esti atenta ĉar la manovradaj signaloj alimaniere doniĝas ol en Germanio.

En la trajnekspedejoj mi interŝanĝis informojn kun aŭstra kolego pri deĵoraj temoj kaj pri la vivmaniero.

Pro lia, por mi iom malfacila, dialekto ni interparolis pere de Fred. kiel tradukisto kaj pere de Esperanto. Pro tio mi mirigis ĉar li ĝis nun kredis ke Esperanto nur estas stultaĵo. Li klarigis i.a. ke li deĵoris 43 horojn po semajno kaj ne ricevas krompagon por labori dimante sed por labori nokte. Lia salajro estas 4620 ŝilingoj, 1300 norvegaj kronoj, po monate, malalta sumo kompare al kelkaj aliaj landoj, sed la prezoj estas samnivele. Post 35 jara deĵorado oni povas fariĝi pensiulo.

Samtempe ankaŭ Fred. klarigis pri la samaj temoj. Lia salajro po monato estas 1485 markoj, sed post fortiro de sumo al impostoj kaj asekuoj li ricevas 1285 markojn, 2240 norv. kronojn, enkalkulitaj 50 markoj po infano po monato. Loĝejo en la fervojista loĝejkonstruadasocio kosvas 130 markojn, 260 norv. kronojn, rela-

tive alta sumo konsiderante la kvaliton de la loĝejo.

Ni vizitis tipan tirolstilan gastejon. En ĉi tiuj regionoj oni kutime kolektiĝas eksterhejme kaj la ĉjo estis plena de homoj. Kelkaj, kune kun sia familio, tagmanĝis, kelkaj legis gazetojn aŭ kartuludis kaj kelkaj diskutis.

Revenante al Garmisch-Partenkirchen ni vespere veturigis trajnon al Munkeno kaj post metado de la lok. en la grandega lok. remizo, al kie venas lok. de tuta Germanio, ni tranoktis en la fervojista tranoktejo.

Dum la restado en Garmisch-Partenkirchen mi vizitis la grandegan, teknikan muzeon en Munkeno. Dank al mia esperantokontakto tie, Anna Kappl, kiel gvidistino tiu tago estis granda travivaĵo.

Venontmatene mi forlasis miajn agrablajn gastigantojn en Garmisch-Partenkirchen kaj tra Innsbruck, kie me devis atendi 12 horojn pro fervojstrikto en Italio, mi trajnis al Roma Termini. Tie atendis min mia esperantista kolego, Antonio de Salvo kiu gvidis min tra la urbo.

Fine mi trajnis al la celo de la vojaĝo, la 22a fervojista esperantokongreso en Rimini.

Per Johan Krogstie.

(Daŭrigo de p. 108)

EL LA MEZO...

vera plago somere kaj, post ĉio, estiĝas tre malgaje dum la longa malvarma vintro atendante ĝian foriradon! Ĉu iu tie havas bileton al paradizo?

Termina noto:

PAR = de, fare de (PV 4 & 9)

FRA = de, ek de, malal
(PV 1 & 2)**Norvega Kroniko****Sukcesa jar-kunveno****de okcidenta distrikto**

Okcidenta Distrikto de N.E.L. ĉi-foje jarkunvenis en la naturbela Rosendal — perlo de la regiono Sunnhordland. Ĉeestis reprezentantoj de la kluboj en Bergen, Odda, Sauda kaj Haugesund, kaj ilin kore bonvenigis la prezidanto, Steffen Kjetland.

Oni kolektiĝis sabaton vespere en «Rosendal Gjestgiveri», nia kunvenejo. La jar-raporton referis la sekretario O. Thormodsen, kaj ĝi rakontis pri relative vasta agado en la distrikto dum la labor-periodo. Okazis kursoj kaj studlaboro, estis regula kunvenado, kaj oni per la ĵurnaloj kaj alimaniere informis pri la lingvo kaj movado.

La kluboj en Okcidenta Distrikto havis reprezentantojn en la jar-kunveno de NEL en Løten pasintjare, same en la Universala Kongreso en Helsinko. La distrikto ankaŭ estis reprezentata en la UK en Vieno lastsomere.

Dum la pasinta 2-jara periodo vizitis kelkajn el niaj kluboj gast-prelegantoj eksterlandaj, okazaĵo instiga kaj kuraĝiga. Kiel kutime estis kontaktado kun kluboj diverslandaj.

La jar-bilaŭco, laŭlegata de la kasisto O. J. Rønnevig, aprobiĝis.

La distrikta estraro dum 2 jaroj estis en Haugesund, nun laŭvice transprenis la klubo en Bergen. La nuna estraro konsistas el: Agnes Hennemann, prez., Doris Birkelund, vicprez., Kristian Sivertsen, sekretario, Lilly Davanger, kasistino, kaj Kjell Offerdal, estrarano.

Pli poste en la vespero estis festa kunesto kun prezentado de plaĉkoloraj filmoj kun interesaj fragmentoj el la landa kunveno kaj el la kongresoj en Madrido kaj Helsinko. Filminto estis O. J. Rønnevig.

La jar-kunveno estis daŭrigata la postan tagon antaŭtagmeze kaj oni vigle priparolis vicon da aktualaj Esperantoaferoj. La ĉefaj demandoj tuŝataj estis oficego de tutlanda vojaĝ-sekretario, kiu eventuale ankaŭ redaktu Norvegan Esperantiston, havigo de mono por NEL por financi tian aranĝon, pliefikigo de la labor-sistemo de nia landa asocio, plivastigo de la Esperanta inform- kaj propagand-laboro kaj pli vigla interkontaktado kaj kunlaboro inter la kluboj, kun interŝanĝo de materialoj, ideoj kaj planoj.

Tagmeze oni vizitis la konatan, tre belan baronejon de Rosendal, — ĝuante la ravan pejzaĝon kaj

la agrablan kuneston kun ges-anoj diverslokaj. Plaĉa vetero kontribuis al bona kaj sukcesa kunesto.

oto

Oslo

2/4 okazis kunveno sub gvidado de A. Torgnes. La nova programero, Vortoj por pripenso, prezentiĝis per du poemoj de Halldis Moren Vesaas («Vegen» kaj «No plantar kvinna») laŭlegitaj de R. Grotmål.

T. Arbo Høeg tradukis Esperanten artikolon, skribitan en la angla lingvo de la mortinta redaktoro de Verdens Gang, Chr. Christensen, kaj li prezentis tiun tradukon, «Pri la norvega konstitucio». La artikolo skizas mallonge la historion de nia konstitucio kaj donas interesan bildon pri la tiama politika situacio en Eŭropo. T. Arbo Høeg ankaŭ prezentis poemon de Jakob B. Bull, dialogo inter grafo Wedel kaj Jonas Rein, — kaj fine montris unu el la plej etaj libroj de la Universitata Biblioteko. Ĝi havas alumetujan formaton kaj estas skribita de Christian M. Falsen.

Prezentiĝis ankaŭ nova numero de la kluba gazeto, «La Vagabondo» sub redakto de J. Berggren, Librovendado kaj lotumado kun bona rezulto.

Raportis K. Ek.

7/6.70. Ni enŝipiĝis en Oslo je la 17.25-a horo, ĉar ankaŭ ĉi tiun jaron Eva kaj Carl Støp-Bowitz invitis la klubon okazigi la junian kunvenon en ilia bela somerdomo en Oxval.

La ĉeestantoj ĝuis la belan var-

man sunplenan somervesperon, kaj post kafotrinkado kaj manĝado nia prezidanto Annalise Torgnes malfermis la oficialan parton de la kunveno. Ŝi bonvenigis ĉiujn, kaj precipe niajn gastojn, inter ili gesinjorojn Markus el Hungarujo kaj s-inon kaj f-inon Matland el Sauda.

Kiel «Vortoj por pripenso» Annalise Torgnes legis norveglingve el la libro «Blues» de Karin Bang, en kiu la verkistino menciias Esperanton kiel «ia morta lingvo»!

C. Støp-Bowitz donis ekzamenan diplomon al John Kvalvåg, kiu jam nun plenumis la elementan ekzamenon. Menciinde estas ke li komencis studi Esperanton la pasintan aŭtunon, kaj li intencas daŭrigi.

C. Støp-Bowitz informis ke Esperanto-insigno el Japanujo nun estas havebla je prezo de kr. 3,—.

Thorbjørn Smådahl amuzigis nin per gajaj spritaĵoj, kaj Thor Magnus Carlsen prezentis historieton.

Elna Matland salutis de la klubo en Sauda, kaj dankis pro la plezuro partopreni nian ekskurson.

Fine multaj el la ĉeestantoj dancis kaj ludis sur la krocketludejo ĝis estis tempo por reiri al la urbo post tre agrabla kunestado.

Raportis *Harda Danielsen.***Haugesund**

MARA VENTO okazigis sian martan kunvenon en la saloneto de KFUK. Inter la relative multnombraj ĉeestantoj estis ankaŭ

kolorajn bildkartojn kaj poŝmarkojn.
Gesroj Klaus Lehmann, Goldammerweg
10, D-8036 DRESDEN, DDR.

pluraj novaj membroj al kiuj la prezidantino, Klara Dahl, direktis apartan bonvenigon.

La programon ĉi-foje havis la prez kiu per plaĉkoloraj lumbildoj kaj akompana rakontado kunvojaĝigis la aŭskultantojn al la sunaj Kanariaj Insuloj kie ŝi vin troferiis. Ŝi vive priskribis la belan, popularan insularon kien nun vojaĝas grandnombre ankaŭ norvegoj por ĝui la klimaton de sunparadizo kaj atmosferon logan. Danke oni aplaŭdis la rakontinton.

Priparolata dum la kunveno estis i. a. la okazonta UK en Vieno kaj estis informate ke kelkaj geklubanoj intencas vojaĝi tien aŭtomobile. Menciata estis ankaŭ la planata komuna flug-vojaĝo skandinava.

Prezentiĝis propono ke oni transigu la kluban libron al la urba biblioteko por ke la libroj estu pli facile alireblaj kaj utiligeblaj. La ĉeestantoj samopiniis ke estus avantaĝo ke la publika librejo transprenu la klubajn librojn.

Korespondu!

S-ro Evgeni Georgiev, 15-jara lernanto, str. Baĉo kiro 35 SOFIA 2, Bulgarujo, dez. kor. kun samaĝuloj en Skandinavio.

36 jaraj geedzoj (industria mejstro kaj advokathelpistino) dez. kor. kolektas

17-jara lernantino, Marta Majländer, BUDAPEST XXI Kalamar f.n. 3, Hungarujo, dez. kor. kun gejunuloj el la tuta mondo. Kolektas bildkartojn, poŝmarkojn. Interesiĝas pri literaturo kaj muziko. Kōmprenas la rusan linvon.

Mia patrino iam havis amindan amikion en Oslo. Nun mi sincere deziras havi amikojn en via lando. Mi estas 42-jara fraŭlino, ŝatas vojaĝojn, fremdajn lingvojn, birdojn k.t.p., laboras kiel pianistino en sporta lernejo. Fino Margarita Dobrinovska, ul. Krum Popov 30, SOFIA 21, Bulgarujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Telefon: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:
Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar